# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

Redakcia adreso: ADOLF WALDMANN, Illerstr. 8, BREMEN, Germanio.


## La lukto de du malamikoj de l'laboristoj.

De Mina Speht.

Ne estis ia kultura batalo, kiu nun estis finita per pacigo inter Pio la XI k Musolini. Du potenculoj reciproke vidigis al si la ungegojn; tiam ili faris batalhaltigan kontrakton, kiu permesas al ĉiu, sin turni al aliaj konfliktoj lin premantaj. Musolini k lia ministro por eksterlandaj aferoj, Grandi, devas observi la ekonomiajn okazaĵojn en la mondo; precipe ili devas atenti, kion intencas Francio fari kun sia oro, sia militista potenco, kun sia politiko sur la Balkano. Pio la XI havas malpacojn kun Litovio, kiu traktas konkordaton kiel paperaĉon; en Meksikio, li devas refortigi la pozicion de l'katolika eklezio, k li devas zorgi pri Hispanio, kiu altgrade rifuzas plian obeon al la eklezio. Ĉu tie estiĝos vero la frazo: „Senfrukte ĝi estas farita, la laboro de multaj jaroj!“ [1] Tian rezulton, Romo ne povas akcepti. Pacienco k prudento necesas en tia tempo, sed precipe nenia dispartigo de l'forto je diversaj frontoj.

Kio interesas ĉe la itala konflikto, estas nur tio – kion oni cetere povis scii jam dekomence: La paco, kiu en 1929, ĉe la finkontraktigo de l'Lateran-Konvencio, estis solene proklamita al la tuta mondo, ne estas vera paco. Ne estas eble, ke la faŝismo de Musolini interkonsentu kun la ĉefpastra pretendo de l'papo; ĉar ambaŭ pretendas kompletan subiĝon de l'homoj sub iliaj celoj. Tiom longe, kiom neniu el ambaŭ rezignas tiun pretendon, ĉiuj kontraktoj por limigo de iliaj potencaj postuloj estas interne malsinceraj.

Tial ankaŭ plue daŭras la batalo de ambaŭ potenculoj, sub la ekstera aspekto de paco. La centro de tiu ĉi batalo estas la lukto pri la junularo; ĉi tie, neniu povas cedi la kampon al la alia. Ĉar fantomojn oni devas encerbigi jam frue, por ke ili fikse restu; oni devas ilin planti en la fundon de l'infana konfido, kiun ankoraŭ ne tuŝis ia dubo.

Krom tiu tasko ekzistas la lukto pri la animoj de l'laboristoj. Kiam, ĉi-jare, la papo proklamis la jubileon de l'„laborista“ enciklika „Rerum novarum“, tio okazis ne nur pro la memoro, sed ankaŭ por „konfirmi la kredon, kiu rekondukas la mondon de l'laboro al la piedoj de l'roma papo“ [2]. Arnaldo Musolini, la frato de l'*duĉe*, tuj respondis tiun proklamon, tiun „emfazan manifeston“, en la „Popolo de Italio“. Treege de supre li juĝis pri la kristana „patronemo“, kiu teorie ja estus tre bona k sincera, kiu tamen ne estus efektivigebla en la ĉiutaga vivo – k kelkajn tagojn pli poste li skribis en „Laboro“, laborista gazeto, ke sole la faŝismo enordigas la laboristan klason en la nacia vivo k firmigas ĝin en la plenumo de ĝiaj devoj k per la rekono de ĝiaj rajtoj. Tio ne estus „prapatraj opinioj“, sed rekonitaj rajtoj, kies bazo estas ne „la perfekta lingvo latina de enciklika“, sed „la realaj fundamentoj de forta ŝtato“ [3].

En tiu lukto pri la junularo k laboristaro de l'itala popolo, la faŝistoj apogas sin sur multaj, ŝtate subtenataj asocioj; la eklezio organizas ĝin helpe de la „Katolika Ago“, de la laika unuiĝo por subteno de l'pastra regado, kiu estas disvastigata tra la tuta mondo. La Lateran-Konvencio precipe fiksis la toleradon de l'Katolika Ago en Italio – sub la kondiĉo, ke ĝi ne okupiĝu pri politiko. Tiu ĉi kondiĉo enhavis la ĝermon de l'nova konflikto. Ĉar, kio estas „politiko“? Katolikaj pastroj k laikoj komencis organizi junularajn asociojn katolikajn, kies membraro kreskis rapide. Ili komencis fondi profesiajn unuiĝojn ekster la ŝtataj sindikatoj, kun instruaj kursoj, kasoj por subteno, profesiaj konsultejoj. Politiko? Ne! Ĉi ĉio servis nur por akcelo de religiaj, moralaj, kulturaj celoj! La itala registaro havis alian opinion: „La ‚Katolika Ago‘ estas nur malbone kaŝata provo, restarigi en nova formo la antaŭan Popolan Partion Katolikan, kiun la faŝistoj malpermesis.“ [4]

La batalo ekflamis en ĉia maniero, kun diplomatiaj notoj de ambaŭ flankoj, kun strataj interpuŝiĝoj, kun malpermeso de katolikaj asocioj fare de la registaro, kun papa plend-skribaĵo al la tuta mondo.

Kaj tiam, subite la paco!

La Katolika Ago daŭras. – Laŭ siaj religiaj celoj, la Katolika Ago ne okupiĝas pri politiko. – En ĝia programo ne troviĝas la fondo de metiaj unuiĝoj. – La samtempa membreco al la Katolika Ago k al la faŝista partio estas permesata.

Tio estas paco inter advokatoj, kiuj posedas la senskrupulecon fari kontraktojn, kies interpretadon ili lasas al bataloj pri povo! Pri klarigo, pri *spirita* lukto de du mondkonceptaroj – nenia vorto! Certe, la Katolika Ago estas retenata en sia antaŭeniro; ĝi devas eltrovi novajn vojojn. Sed ĝi vivas – tiu organizo, pri kiu la papo deklaras, ke ĝi estas la bazo k apogo de l'publika progreso; k kiun ĝia prezidanto opinias kapabla, ke ĝi estus savinta Hispanion el la manoj de la tieaj „krimuloj“.

Ne! Kultura batalo ne okazis tie ĉi. Batalon kontraŭ la eklezio riskis Meksikio, okazigas Sovetio, komencis Hispanio. Nepra kondiĉo por tia batalo estas la ekzisto de *konvinko*, kiu direktiĝas kontraŭ superstiĉo k eklezia subpremado. Tia konvinko, kiu ebligas principan batalon kontraŭ la eklezio, tute ne ekzistas ĉe la nuna reganto de Italio. Li forĵetis sian kontraŭ-eklezi-econ, kiam ŝajnis rekomendinda, aldoni la brilon de l'Sankta Romo al la brilo de l'faŝismo. Tia homo ne brulvundas siajn fingrojn ĉe la fajro de iu eklezio, precipe ne ĉe la katolika eklezio, kun kiu li loĝas najbare. Kiam la Vatikano (la katolika estraro) utilas al li, tiam li toleras ĝin, koncesias al ĝi lernejojn, familiajn registrejojn, ja, eĉ kelkajn kvadratkilometrojn da tero. Kiam la Vatikano ĝenas lin, tiam li permesas al la faŝistoj, bastoni sur la stratoj katolikajn junulojn, detrui episkopajn administrejojn k moki en la gazetaro la „sanktan patron“. De tia kontraŭulo de l'eklezio liberpensuloj povas atendi nur tre malmulte. Kompreneble, ili ĝoje akceptas, se Musolini malfortigas la eklezion. Sed la bruo dum la pasinta somero, pri kies disaŭdigo zorgis ne nur Musolini, sed ankaŭ tre bone la eklezio, ne estis tiom grava. El la nun farita kontrakto ja rezultas kelkaj domaĝoj por la eklezio, sed samtempe la batalo donis al ĝi novan forton ekscitante kompaton en la koroj de la kreduloj. Do, entute ĝi kaŭzis eble veršajne eĉ ne tiom da domaĝo, kiom kaŭzas liberpensuloj, kiuj sen bruo eksiĝas el la eklezio.

*El germanlingva „ISK“ n-o 10, okt. 1931.*

[1] Ŝiler: „Don Karlos“.

[2] „Ecclesiastica“ (katolika korespondaĵaro) n-o 27, 4. julio 1931.

[3] Samloke, n-o 28, de 11. julio 1931.

[4] „Mallongaj Informoj Germanaj“, kajero 36, 3. sept. 1931.

**LASTHORE: La XII-a SAT-Kongreso okazos en Ŝtutgart. La unua komuniko aperos en la proksima n-o.**

**Por ke „LNE“ pluvivu!**

16599 Duif (Amsterdam) guld. 0.50